say that if it had not been for our 'AMERIKA ESPERANTISTO,' I would have given up trying to acquire a knowledge of this language; being alone in this section, with no one to consult, it is very discouraging, but with the magazine each month, I always get interested in the news contained therein, and again dig into the Grammar with renewed vigor. It takes time, money and patience to attend to the business of this ASSOCIATION, and if someone does not devote the time to such work, this ASSOCIATION and the interest in this language would soon become dormant and gradually die out entirely.

"We have got to work together and work hard, in order to advance this subject as it is now advanced in foreign lands. I suggest that every member of this ASSOCIATION, and every one that should be a member, assess themselves the sum of one dollar, and remit same to our Secretary to be applied on his salary, and I enclose herewith draft for the 'starter.' This will be a little 'religious movement' of our own, and it 'counts.'

"——— ———."

ANOTHER INTERNATIONAL MATCH.

With pleasure we receive the announcement of the engagement of Mr. D. E. Parrish, of Los Angeles (who is well known as the esperantist lecturer in Europe in behalf of Southern California), and Miss Poula Grave, of Co-

penhagen, Denmark. A cordial welcome will be ready in America for these friends,—and incidentally the great advantage it is for Americans to know Esperanto has again been emphasized.

DEATHS.

We announce with deep regret the death of three well-known members of the "esperantistaro" of the United States this month:

Dr. James V. Oglesby, of Danville, Pa., a physician well known throughout the state, and a prominent citizen of Danville, died the 21st of March. He had been an esperantist for several years, and had exerted much influence in behalf of Esperanto.

Mr. William J. Burnham, of Lewiston, Maine, a member of the Portland Esperanto society, died last month. Although he had not been able to attend the meetings of the society, he was an active esperantist, and his loss is deeply felt.

Mr. Robert S. Sparkman, of Juniorville, S. C., died February 14th, and was buried at his old home, Prince Fredricke Chapel, February 15th. Mr. Sparkman was an energetic esperantist, who obtained much newspaper publicity for Esperanto, through his journalistic work, and always manifested much enthusiasm.

On behalf of the esperantists of the United States, we extend sincere sympathy to the bereaved families of these esperantist friends.

The Annual Meeting.

THE annual meeting of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, and the Convention in connection therewith, which will meet in Boston, Mass., the ninth, tenth and eleventh of July next, under the auspices of the NEW ENGLAND ESPERANTO ASSOCIATION, promises to be the most interesting of any purely North American meeting which has been held.

While the committee is not yet ready to announce in detail the plans for the

entertainment features, energetic sub-committees are at work on each of the various parts of the convention. Mr. Payson is chairman of the Programme and Ways and Means Committees, the Committee on Music is in charge of Mr. N. H. Hastings, Mr. R. A. Chandler is chairman of the Entertainment Committee, and Mr. George Winthrop Lee is planning some enjoyable excursions.

One excursion being planned by the committee will certainly be interesting to us as Americans, if not as Esperantists,

for the committee proposes to take the members of the convention over the historic route made famous by the "Midnight Ride of Paul Revere." Trips to some of the many points of great historical interest and to noted beach resorts about Boston are also being arranged.

A goodly number of tickets for the Convention have already been purchased, so you will not be alone if you come; a large proportion of the oldest and most fluent American Esperantists will attend, so practice in hearing and talking Esperanto is assured; a large

propaganda meeting, with an address on Esperanto by Dr. D. O. S. Lowell, will be held, so there will be enthusiasm and opportunity for good "missionary" work; and the possibility of a grand good time is well known to anyone who has attended a meeting in this city.

The tickets for the Convention are one dollar each, and may be secured from Dr. C. H. Fessenden, 34 Pelham St., Newton Center, Mass., or from THE ESPERANTO OFFICE, Washington, D. C. *Please buy your ticket at once* so the attendance may be estimated.

HAVE YOU READ THIS?

An interesting example of the use of Esperanto to short-story writers is seen in "the Occult Detector," which began in the *Cavalier* (a *Munsey* publication) of February 17, and ended in that of March 23. While only a few phrases of Esperanto appear, the language is mentioned conspicuously, and a good characterization of it given. Therefore esperantists will enjoy the story, aside from its intrinsic interest. When you have read this,—or in fact whether you read it or not,—do not fail to send a note or postcard of appreciation to *Editor of the Cavalier, New York City*, expressing your satisfaction with the treatment accorded Esperanto, and intimating a hope that they will continue to give Espe-

ranto more or less prominence in all of the *Munsey* publications.

The *New York Mail*, the *Chicago Tribune*, the *Kirksville Democrat*, and still other papers, are among those which to date have printed Esperanto versions of the "Houn' Dawg" song. Thus we see how even a matter so remote from International Language, as U. S. campaign politics is, can make use of Esperanto!! Here is one of the versions:

FOR ESPERANTISTS.

Kiam ajn mi eniras la urbon nian,
 La buboj turmentas la hundon mian;
 Oni povas malami besteton tian,
 Sed ne plu turmenti la hundon mian.
 VERDA STELO.

For the Beginner.

Will you kindly discuss the sound of "e" in the department For the Beginner? I have learned from all the text-books I have studied that it is pronounced as the "e" in "do, re, mi," or as the "a" in "fate," etc. Now comes a teacher of Esperanto who says, "Pronounce it as 'e' in 'Eŝa.'"

One might be tempted to reply "If the teacher in question is an esperantist of such world-wide and admirable reputation that his word outweighs all the text-books, why, take his word!" But a serious explanation of the apparent discrep-

ancy is, that the text-books have in mind a pedagogical fact which is to be noted: A student who learns the "do, re, mi" sound of "e" will always pronounce it distinctly, and will not in rapid conversation shorten it more than will result in the "etta" sound of "e." Therefore he will always be understood. But if the beginner learns the "etta" sound of "e" to start with, he is exceedingly liable to shorten it into the "universal American and English vowel" represented by "u" in "but,"—which does not add to the musical effect or clearness of his pronunciation.

Al Mia Mortinta Hundo Mahdi

Ho! kiel ofte, kara hundo mia,
Kun mi vi manĝis, ludis aŭ promenis;
Trotante apud mi, en buŝo via
Bastonon mian vi fiere tenis.

Kun mi, portante al la urbvendejo
Korbeton mian, vi matene iris,
Kaj je l'somero, por la kuirejo,
Vi branĉojn de pinarbo hejmen tiris.

Kaj ĉiam vi, simile al infano,
Salutis min antaŭ la dormohoro,
Veninte por kares' de l'mastromano;
"Feliĉan nokton" diris via koro.

El nobla hunda ras' vi ne naskiĝis;
Vi estis nek tre lerta nek tre bela,
Sed mia viv' pro vi pli feliĉiĝis,
Ĉar vi min amis, ho amik' fidela!

Vi mortis; Ĉu mi vin revidos iam?
Ni estas ĉiuj unu familio,
Kaj se post mort' mi renaskiĝos, tiam
Vi ankaŭ vivos, kreitaĵ' de Dio.

Dear dog of mine, how often I remember
The meals, the games, the runs we had together;
How proud you were my walking stick to carry,
And wanted my umbrella in bad weather.

In town you used to go out with me shopping,
My basket in your mouth—you'd sometimes drop it—
And in the mountains where we spent our summers,
You brought the larch-wood home, that I might chop it.

You never went to bed without first coming
To have a pat and get my good night greeting;
You wagged your tail, and rubbed your nose against me,
And seemed to say "Farewell till our next meeting."

You were not thoroughbred, or very handsome,
But died too soon, although you seemed so hardy,
For your affection made my life more happy,
And I am grateful to you, my good Mahdi.

We are one family! If I'm immortal,
Then so are you, and though your bones are lying
Beneath the garden roses, you are living
With all souls in a world where there's no dying.

CLARENCE BICKNELL,
Bordighera, Italujo.

Nepagita Ŝuldo

RAJTIGITA TRADUKO EL LA VERKOJ DE HELENE CHRISTALLER.

(Denove mia filo prezentas al la esperantistaro tradukon el "Meine Waldhauser" de sia onklino. Komparu AMERIKA ESPERANTISTO de septembro, 1911, paĝo 5a.—Paul Christaller.)

WALDHAUSEN' estis tre longe etendita vilaĝo, kaj konsistis el du partoj, interligitaj inter si per popla aleo. Malantaŭ tiu aleo troviĝis altaĵo, la "Poppelbühl" (poplo-monteto), sur kiu, iom flanke, staris malgranda dometo. De la strato ĝi estis kaŝata per arboj, sed kiam oni staris supre, ĉe la rando de la arbaro, tiam oni povis de malproksime vidi la blankajn kalkmurojn kaj fenestrovitrojn brilantaj en la lumo de l' subiranta suno. Tio estis rava, —la arde ruĝa helo el la verdaĵo.

La loĝantoj de la dometo belete vivis. La unua sunradio, kiu matene ekaperis malantaŭ la arbarkovritaj montaj, trafis la malgrandan dometon; kaj la lasta, kiu malsupre en la ebenaĵo de la Rhein-valo allumiĝis, diris al ĝi adiaŭ. Krom tio, estis bele ke ili loĝis sur la altaĵo. Kvan-kam ili estis nur kelkajn metrojn super la vilaĝo, tamen ili estis iom ekster la rondo de homoj; kaj tio estas ĉiam bona. Oni devas resti iom aparte, por ne sufokiĝi kaj por ne perdi la bonhumoron; eĉ malgranda monteto povos utili iomete je tio.

En la poplodometo loĝis Margaret Reister, nomita "Missionsgret" (misiema Grenjo). Ŝi estis jam tre maljuna virineto, sed ankoraŭ posedis viglan spiriton kaj babilemon. La laboro ne plu prosperis tiel rapide, tio estis ŝia ĉagreno, sed je la plej necesa, la ĝardeneto, la terpomkampoj, kaj la peceto da herbejo, ŝia forto ankoraŭ sufiĉis.

Si aspektis ĉiam ordema, kun la blanka aŭ nigra kaptuko, sub kiu la viglaj okuloj scivoleme elrigardis el maldika sulcita vizaĝo. La poŝo de ŝia maldelikata nigra jupo, kies lanon ŝi mem estis ŝpininta, ĉiam bulforme elstaris; ĉar ĝi estis plena je malgrandaj, nigre fumajitaj prunoj, kaj brunaj sekberoj; kaj la Waldhausen' aj infanoj havis liberan aliron al tiu poŝo.

Missionsgret havis du edziniĝintajn filinojn, kaj ŝi iris de unu al alia, portante ŝtonan laktujon, kaj en korbeto ian bonajon, kiun ŝi estis ŝparinta kun propra rezigno. Ŝi devis multe penegi, la maljunulino, sed malgraŭ la batalo kontraŭ ĉiutagaj aferoj, ŝi tamen havis tempon kaj intereson okupi sin pri aferoj iom flankaj kaj idealaj. De tio ŝi ankaŭ havis sian nomon, ĉar ŝi kolektis por la misio. Nelace ŝi iris de domo al domo, komence de la monato, por kolekti la monerojn dek- kaj dudekpfenigajn, kiuj post unu jaro faris sufiĉe grandan sumeton, kiun ŝi honeste administris kaj sendis al Basel je la unua de ĉiu januaro.

Kompreneble Gret iris ĉiudimanche al la pietista kunveno, kiun laikoj aranĝis, sed ŝi estis ankaŭ tre klerikema, kaj neniam ŝi sentis pli grandan feliĉegon, ol kiam ŝi sidis ĉe la vintra biblia instruado en la tro multe hejtigita lerneja ĉambro, dum ekstere neĝis kaj ventoj blovegis. Ĉirkaŭe sidis gesamcelanoj en la nehela ĉambro, for de la penoj kaj klopodoj de la labortago; je la fenestro estis la instruisto kun violono, sur kiu li ludis belan pian himnon, kaj sur la katedro staris la juna vikario, kiu parolis plej bone dum tiuj vesperoj, ĉar ekzistis pie-mo inter la aŭdantoj. Ankau alie Gret serĉis okazon por pruvi sian fidelecon al eklezio, protektante per siaj gardemaj avinmanoj persekutitajn pastrojn kaj vikariojn. Jen kio okazis unu fojon:

Ekstervilaĝa "frato," tre ŝatata pro siaj piemaj diroj, estis predikinta en la domo de Burklehannes je dimanĉo posttagmeze, kaj post tio oni ankoraŭ edifiis sin per piaj paroloj. Sed post kelka tempo tiuj ĉi paroloj iomete malleviĝis de sia alteco, kaj ekfariĝis nur klaĉado. Nun ili babildis pri la juna vikario Lederer. Oni sciis kelkajn anecdotojn pri li: edziĝfestajn paroladojn pri la senluziigoj de edzeco, dum kiuj sekrete

ridetis ĉiuj virinoj, ĉar la parolanto aspektis tre juna kaj nesperta. Krom tio, oni akuzis lin pri edifaj funebraj paroladoj, kiujn li estis elektinta por vere malindaj personoj. Sed ekzistis ankaŭ pli gravaj duboj; Burklehannes asertis esti rimarkinta ke la vikario ne preĝas dum vespersonorado; la ŝafistino raportis ke dimanĉon li ludis tre profanajn melodiojn sur la piano; kaj Gerberfritz eĉ pretendis esti aŭdinta el la prediko vere malortodoksajn opiniojn. Al alia ne plaĉis ke la vikario iam donis vangfrapon al impertinenta bubo, "kristana viro ne devus tiel koleriĝi;" kaj iu virino plendis ke sur la strato li preterpasis ŝin, ne salutinte.

La alia tiel babilema *missionsgret* sidadis tute silenta, nur direktante siajn okulojn de unu al alia. Generale ŝi ne malinklinis al iom da babilado, sed ŝi multe ŝatis la junan vikaron; li kondukis tiel respektive pri maljunaj virinoj; krome, ŝi volonte donus unu fojon al pia Burklehannes "kristanan admonon;" pro tio ŝi diris fine: "Mi nur kredas ke ni ne plibonigas lin kiam ni riproĉas, ni pli bone preĝu por li."

Ĉiuj silentiĝis tuj, kaj aspektis iomete embarasitaj; fine Hannes diris solene, "Gret estas prava, ni portu la junan viron sur preĝanta koro." Tiam oni rapide disiris, ĉar ĉiu iom hontis antaŭ la alia.

Jam de kelkaj jaroj, de kiam ŝi estis vidvino, la maljuna virineto opiniis ke entute Dio povas esti tre kontenta pri ŝi: Antaŭe ŝia edzo kelkfoje estis ekscitinta ŝin al nekristana kolerero, aŭ pro sia avareco deviginta ŝin iri laŭ nerektaj vojoj, sed tio jam longe forpasis, ŝi ne plu pensis pri ĝi. Oni povis diri pri ŝi nenion pli malbonan ol ke je komerco ŝi iomete malprofitigis virinojn nespertajn, kaj eble ankaŭ ke ŝi ankoraŭ ne venkis homajn ĝuojn, ekzemple bonan kafon kaj blankan kukon. Sed alie ŝi estis honesta virino, diligenta kaj pia, tion devis konfesi eĉ la diboĉema tajloro, kiu loĝis ĉe la bazo de *Poppenbühl* en malgranda dometo, kaj tro volonte kalumniis la pietistojn kiuj sin sentis tiel justaj.

Sed unufoje Gret grave pekfalis. Neniu sciigis krom la maljuna pastro, kaj tiu estis diskreta. De tiam ŝi forjetis al la tineoj la mantleton "farisean," per

kiu la Waldhausen'aj piemuloj volonte ornamis sin; kaj ŝi traktis tiel milde eĉ la pekantojn, ke la tajloro diris, ke baldaŭ ŝi estos tro bona por ĉi tiu mondo. Li ĝin diris ironie, tamen kun iom kaŝita respektemo.

Estis decembro, Kristnasko alproksimiĝis, kaj la marĉandistoj jam komencis iri de domo al domo. Unu kolportisto vendis siajn librojn kaj bildojn, neeklezia kolego siajn indianajojn kaj rabajojn. Nun venis ankaŭ la ŝuisto Louis, kiu estis unubrakulo, kaj kolportis la ŝuojn faritajn de pli feliciaj fratoj. Tiun atendis Gret, ĉar jen estis la nepo Fricjo, kies ŝuoj fariĝis tro malvastaj; la bubo estis multe kreskinta, kaj Karl jam atendis heredi liajn demetitajn vestaĵojn. Marie jam eklernis iradon, ŝi ne povis iri sensue sur la malvarma planko. La dunaskitoj Johann Georg kaj Georg Johann havis disiritajn dimanĉosuojn, kaj la patrinoj plendis al la avino, ke ili ne scias de kie preni la multan monon.

La ŝuisto venis. Li rajtis sidi ĉe la fajrujo, kaj ricevis tason da kafo dum la maljunulino severe ekzamenis lian komercaĵon. Kun grandaj okulvitroj sur la nazo, ŝi palpis la ŝuojn interne kaj ekstere, kunfrapis la plandojn, kaj plendis al Louis ke la vendotajo ne valoras duonon da tiom, kiom li postulas. Ĉar li ŝin konis, li trankvile trempis sian bulkon en la varmegan kafon, ree kaj ree certigante ke li preskaŭ neniam gajnos de la komercaĵo. Pri tia pretendo la marĉandosperta maljunulino havis nur la bonanime ironian ekkriion, "Ho, Dio, neeble!"

Fine ili interkonsentis. Kiel regimento da soldatoj la malegalaj ŝuparoj staris unu apud la alia, antaŭe paro da grandaj dikaj feltoŝuoj, kiujn la avino decidis por si mem. Tiam ŝi iris al sia ĉambro por kunserĉi la ŝparitan monon. Tio estis malfacila laboro. La misia monujo (malnova ŝtrumpo de ŝia edzo) ŝvelis pro arĝentaj kaj nikelaj moneroj, dum la propra havaĵo kuŝis apude, enfermita en tuketo; kaj kiel ajn ofte ŝi kalkulis, tamen mankis ankoraŭ ok moneroj. Tra la maŝoj de la bruna ŝtrumpo brilis la arĝento, kiu mallaŭte sonis kiam ŝi puŝetis ĝin. Tien ŝi jam estis enmetinta kvar el siaj propraj markpecoj,—unu je ĉiu

kvaronjaro. Se ŝi posedus ilin, kaj la kvar de la pasinta jaro, kiujn ŝi jam forsendis! Sed ne, ili estas oferitaj al la Savinto, ŝi ja ne povis repreni sian donacon.

Ekstere tusetis malpacience Louis. Lia manĝo estis finita kaj li volis foriri.

“Mi certe ree gajnos tiom, ankaŭ ol mi ĝin forsendos,” diris al ŝi la maljunulino, trankviliĝante, kaj rapideme elprenis ok markojn el la pormisia ŝtrumpo. Ciuj arĝentaj moneroj subridis kaj murmuretis ĉe tia rabo de la sanktaĵo, kaj Gret pro timo tiel abrupte fermis la tirkeston, ke ŝia fianĉina girlando sub la kloŝo ek-tremis, kaj ŝia dika edziĝfesta biblio ren-versiĝis. Tiam ŝi rapide iris al la kuirejo, donis al Louis la monon, kun timema rigardo al la pordo, kaj respondis per malkontenta murmuro al lia deziro pri ĝoja kristnasko.

La maljunulino estis sola. Denove ŝi ekzamenis sian aĉetaĵon, kaj ĝeminte forfermis ĝin en la ŝranko. Sed io premis ŝian koron; kvankam ŝi laboradis en la domo kaj bovinejo ĝi fariĝis pli nesuferebla dum la suno subiris. La vespersonorilo sonoris, dum ŝi estis melkanta. Gardeme ŝi forprenis la duonplenan tineton, por ke la senpacienca bovino ne renversu ĝin, kaj interplektis la ostajn multe laborintajn manojn. Sed ŝi estis malatenta. Inter la strofoj de ŝia vespera himno rulis la rondaj arĝentaj moneroj; kaj la tinto de la bovina ĉeno tiom timigis ŝin ke ŝi tremis.

“Ho, ve,” ŝi ĝemis, “kia sufero!” Cagrenplena, ŝi melkis la bovinon kaj restis mediteme sidanta sur sia skabelo. La lakton ŝi ne povos vendi, ĉar Karlina havas malgrandan infaneton, krom kvar aliaj, sed ne posedas bovinon, Rosine havas ankaŭ tri infanojn, kaj ŝia kaprino donas malmulte da lakto nun dum la vintro; kaj al malgranda Fricjo de Annegret la doktoro receptis du litrojn da lakto ĉiutage.

Ciuvespere la filinoj venis, kompreneble, alportante malplenajn laktujojn, por forporti ilin hejmen plenigitaj je lakto,—ĉar maljuna patrino ja ne bezonis tiom da lakto! La kokinoj ne plu demetis ovojn, de kiam estis tiel malvarme, kaj la junaj kokinoj ne komencos ĝis post kvar semajnoj, tamen je unua de januaro ŝi devos forsendi la misian monon. Unu el la maljunaj kokinoj eble

estis vendebla: estis domaĝe, ĉar ĝi ankoraŭ donis ovojn; sed ĝi havis laman kruron. Fine ŝe decidis iri al Feldbach kie loĝis tute nesperta juna pastredzino: ŝi eble donos al la maljunulino du markojn por tiu maljuna kokino.

Kiam Gret iris al lito, ŝi longtempe ne povis dormi. “Vi ne ŝtelis de homoj, sed de Dio,” ŝajnis diri punanta voĉo, simila al la voĉo de “frato” Nagel, kiu kelkfoje prezidis la kunvenon. La maljuna virino vane senkulpigis sin, “Tio ja estis mia propra mono.” Ŝi sentis la malpravecon de sia respondo, kaj ĝemante ligis la dikan noktokufon pli firme sur la orelojn, por ne aŭdi riproĉojn.

La sekvintan tagon ŝi iris al Feldbach, unu horon malproksima, kunportante en korbulo sub la brako la kokinon kondamnitatan al morto. Estis neĝinte, kaj ŝi pene vadis laŭ la mallarĝa vojeto tra la arbaro. Sed, kia teruro! Kiam ŝi sonorigis ĉe la pastra domo, ne aperis la beleta blonda virino, sed ĉi ties patrino, kiu estis veninta por la kristnaskaj tagoj! Sub la spertaj okuloj de tiu decidema virino, Gret ne kuraĝis postuli pli multe ol marko kaj kvindek, kaj fine ricevis nur markon kaj tridek pfenigojn, vane laŭdinte la junecon, grasecon, kaj grandan pezon de sia vendajo. Ŝi preskaŭ ploris pro seniluziigo, kiam ŝi devis foriri kun malpeza korbulo kaj multepeza koro.

Pasis tago post tago, kaj nenia rimedo troviĝis. La maljunulino fariĝis tre melankolia, kaj perdis apetiton. La ĝojego de la genepoj pro la deziritaj ŝuoj ne kaŭzis al ŝi rideton, ka kristnaskaj kantoj ne ŝin edifis; ŝi juĝis sin elpuŝita el la komunumo de sanktuloj, kaj brulmarkita. Pro tiu sento ŝi sidis sur malantaŭa nehela benko en la preĝejo, apud Paŭline Genger, kie volis sidi neniu alia, ĉar Paŭline havis tri bastardajn infanojn, ĉiun de alia patro.

La filinoj miregis pri la patrino. Ne ĝojigis ŝin eĉ bela granda kukopano, kiun Kartine bakis pro la festo, nek la sukero de Rosine, nek funto da kafo de Annegret. La patrino verŝajne estis malsana. Survoje Rosino renkontis la maljunan pastron, kiu demandis pri ŝia farto. Al li ŝi rakontis sian maltrankviliĝon, kaj li promesis tuj viziti la patrino. Sin apogante sur bastono, maljuna pastro Werner pene supren iris la gliti-

gan vojon, kiu kondukis al la poplodometo,—vojon, kiun la buboj uzis por glitveturejo dum la festotagoj.

Li forfrapis la negon de siaj botoj, kaj iris palpante tra la malhela koridoro al la ĉambropordo. La avino ektimegis, kiam ŝi vidis eniri la pastron. Tiumomente ŝi tenis en mano la malplenan ŝtrumpon, elversinte sur la abia tablo la konfidantan monon por la misio.

“Ne ektimu,” ridante diris la pastro, “mi ne estas ŝtelisto.”

Ce la vorto *ŝtelisto* ŝi ekrugiĝis kaj malkonfideme rigardis la vizitanton.

“Nu, kiel vi fartas, Gret?” demandis la pastro, mirigite pri la konduto de la maljunulino, kiu kutime estis tre afabla.

“Ho,” ŝi respondis, hezitante, “laŭorde, ne bone.”

“Kial tio estas laŭorda?”

“La peko estas la pereco de la homo.” Ŝi rigardis funebre kaj rigide la monkovritan tablon.

Kie estis ŝia fariseeco, ŝia ĉiama kontenteco pri ŝi mem? Ĝi estis forfluginta kiel fabela sonĝo, kiu ne kontraŭstaras realecon.

“Via filino diris ke vi ne bone fartas?” demandis la pastro, atentege ŝin rigardante.

La maljunulino neis melankolie per la kapo. “Mi ne estas malsana.”

“Sed io mankas al vi, laŭ saneco aŭ animo. Se mi povas helpi al vi, diru ĝin,” proponis per konfidinda voĉo la maljuna viro.

Radio de espero eklumiĝis en la koro de la virino. Al tiu ĉi homo, kiu estis maljuniĝinta kun ŝi, kaj kiu milde kaj bonintence rigardis ŝin, el sub siaj longaj blankaj haroj, ŝi konfidis sian sekreton, kaj li ja gardos ĝin ĝis la tombo, eble li ankaŭ povos konsili kaj helpi al ŝi. Per hezitanta voĉo kaj kun mallevitaj okuloj ŝi komencis sian konfesion.

Pastro Werner ne rigardis ŝin, li desegnigis mediteme per sia bastono sur la blanka sablokovrita planko.

Kiam ŝi finis, ambaŭ silentis momenton, dum la horloĝo tiktakis laŭte, kiel maltrankvila koro, kiu estas vipata antaŭen kaj neniam rajtas ripozi. Grandaj larmoj elfalis el la okuloj de la maljunulino, kiu ne forviŝis ilin. La pastro etendis sian manon kaj kviete prenis ŝiajn brunajn malmolajn fingrojn.

“Gret,” li diris milde, “mi volas helpi

vin. La duonon de la fordonita mono mi anstataŭos al vi; tio estas, kio rilatas al la pasinta jaro, kies monon vi jam forsendis. La alian duonon vi restos ŝuldanta al Dio, kaj vi donos en la nuna jaro neniom por la misio.”

“Mi neniam ŝuldis ion al iu, nek al homoj, nek ankaŭ al—” Ŝi haltis kaj ne kuragiĝis fini. La pastro ridetis.

“Al mi vi ankaŭ neniom ŝuldos, ĉar vi povos repagi.” Sed rilate al Dio,—al Li vi nur ŝuldu ĝin, ĉar certe la mono ne estas la sola ŝuldo, kiun vi havas al li.”

La maljunulino profunde mallevis la kapon kaj ankoraŭ silentis.

“Sciu,” daŭrigis la pastro impresige, “justeco estas io bona, sed indulgo pleniĝas la koron je amo.”

Kaj *Missionsgret* ne pagis la kvar markojn al Dio. La genepoj ĉiam bezonis ion,—ŝuojn, aŭ pantalonojn aŭ jupojn; ŝi neniam povis pensi pri pagado de la malnova ŝuldo, kiom ajn ŝia honoramtion deziris. Sed konscio, ke ŝi ŝuldas ion al iu, faris ŝin tiel humila kaj bonkora, ke ŝi fariĝis la plej bela ornamo de la komunumo.

La sekvintan someron kreskis apud la domo de la virino, je la plej sunplena flanko, malagrabla odoranta terpomsajna herbo, kiun la maljunulino kun granda zorgo ĉirkaŭhakis, sterkis kaj akvumis, dum neniu el la genepoj havis permeson alproksimiĝi. Kiam fariĝis aŭtuno, brilis inter la grizverdaj folioj belformaj, purpurruĝaj fruktoj, nekonataj en Waldhausen. Paradizpomoj la avino nomis la tomatojn, kaj tio delogis malgrandan Fricjojn tiom, ke li ŝteletis unu el la fruktoj. Sed ĝi havis tiel malbonan guston, ke li elkraĉis ĝin kun abomeno, kaj atendis dum tuta tago ian teruran okazon, pro gustumo de malpermesita frukto.

Al la pastrodomo la maljunulino alportis la maturajn fruktojn. Tie en la multe ombrita ĝardeno ili ne prosperis, pro tio la pastro tiamaniere lasis al ŝi repagi sian ŝuldon al homo. Sed al Dio ŝi restis ĉiam ŝuldanta, ĝis post jaroj la morto dolĉe fermis ŝiajn okulojn, ĵus kiam la unuaj radioj de leviĝanta paskosuno orumis la fenestretojn de la poplodometo.

El la germana tradukis

WILHELM CHRISTALLER,

Stuttgart, Germanujo.

Geknabetoj

LA domo plej proksima estis okupota! Metante sian vizaĝon kontraŭ la fenestro, tiel proksime kiel lia nazo estis premata preskaŭ plata, Teddy (*Tedi*) povis vidi la ŝarĝveturilojn, kaj la virojn kiuj estis malsarĝantaj ilin. Se nur li povus malfermi la fenestron! Sed estis frua printempo, tial tia ago ne estis pripensebla. Unuope la mebloj estis elprenataj el la veturiloj, kaj la viroj moviĝis tre malrapide.

“Ho,” pensis Teddy, “kial ili ne marŝas pli rapide?”

Li jus eksentis ke lia nazo doloras, kiam li ekvidis ion ruĝan. Tre silente li malfermis la fenestron kaj elpuŝis sian kapon. Jes, li estas prava, tio estas malgranda veturiletto! Tiu ĉi estis certa pruvo ke estas knabo en tiu familio. Li scias ke knabeto nepre loĝas tie. Ĉu li ne esperis tion, kaj preĝis dum multaj semajnoj ke tio okazu?

Kiam la lasta ŝarĝveturilo malaperis laŭ la strato, Teddy silente iris malsupren en la korton, kaj staris apud truo en la barilo, por rigardi la malantaŭan parton de la najbara domo. Lia nazo ankoraŭ sentis malkomforta. Tre zorge li ĝin palpis; ĝia ekstremajo certe ŝajnis supren kurbita! Eble ĝi ĉiam restos tia. ‘Teddy esperis tion, ĉar la nazo de Micky (*Miki*) Egan supren kurbas, kaj Micky, antaŭ ol li foriris, estis lia plej bona amiko. Micky ankaŭ havas lentugojn kaj strabajn okulojn. Teddy havis neniujn el ĉi tiuj, kaj la penso pri tiu fakto preskaŭ tro dolorigis lin. Ĉiuj aliaj knaboj posedas tiajn aferojn.

Remetinte la okulon ĉe la truo en la barilo, li atendis. Sed kvankam li restis tie ĝis kiam la suno malsupreniris, kaj li fariĝis malkomforta kaj malvarma, li vidis neniun krom la virino kiu purigis la fenestrojn. Tamen li ne sentis ĉagrenon. Restis sufiĉe da tempo. Eble la knabeto ankoraŭ ne alvenis.

Teddy eniris en sian hejmon por vespermanĝi, sed li estis tiom ekscitita ke li

forgesis laŭi la manojn. Post kiam oni sendis lin por fari tion, la manĝado ne plu interesis lin. Neniu volus elspezi tutan horon en preparado!

Kiel eble plej baldaŭ li ree eliris en la korton. Tiun ĉi fojon li decidis esplori pri la antaŭa parto de la najbara domo. La nova familio estis kunvenanta en la ĝardeno. Tio ja estis bonŝanca. Teddy rampis sur la siringarbeton, de kie li povis vidi nevidata. La grupo ŝajnis esti nur gekreskintoj. Senspire liaj okuloj serĉis etulon. Lia koro batis tiel rapide ke li preskaŭ perdis la ekvilibrion. Post nelonge malgranda infano ekaperis, kurante antaŭen. La koro de Teddy eksaltis, tiam ŝajnis ĉesi batadon. Jen, ĝi estis nur knabino! Kia domago! Tio estis tro multe por suferi. Io leviĝis en lian gorĝon, kaj apud lia koro ŝajnis kvazaŭ io rompiĝis. Li kuris en la domon por trovi la patrinon. Ŝi komprenis, ŝi estis jam timanta tion, kaj ŝi demandis nenion. Estus ja vane peni konsoli lin. Teddy sciis ke li neniam ree sentos same kiel antaŭe. Kiel do estas la vivo elportebla, se nur knabino loĝas en la najbara domo? Estus pli bone ke oni vivu tute sola. Li ekrememoris pri la bela tendeto, kaj siaj “vestoj de ruĝhaŭtulo,” kun la terura penso ke li ne plu bezonos ilin.

Kial ĝi ne povus esti knabo? Tra la silento de la ĉambro la granda horloĝo ŝajnis diri “knabin’, knabin’, knabin’.” La malgranda franca horloĝo gaje ĝin ankaŭ diris, ŝajnante multe plaĉita. La knabo aŭskultis, leviĝis, kaj irinte al la horloĝo haltigis la pezan pendolon. Sed la franca horloĝo ŝajnis pli gaja ol antaŭe, kaj preskaŭ ridis la silabojn. “Same kiel knabino,” kolere pensis Teddy, kaj elportis la ofendantan horloĝeton el la ĉambro.

La sekvintan matenon, kiam Teddy sidis malgaje tranĉante bastoneton, kaj pensante pri la ĉagrenoj de la vivo, liajn pensojn interrompis la vortoj “Bonan matenon, knabeto.”

Teddy ekrigardis supren. Antaŭ li staris la knabineto.

“Mi venis por ludi kun vi,” ŝi anoncis.

Li rigardis ŝin malagrable. Ŝi do estis veninta por ludi! Nu, ŝi simple reiru! Li respondis “Neniu invitis vin. Plie, vi ne scias kiel ludi. Knabinoj neniam scias tion.”

La mentono de la knabino leviĝis kelkajn colojn.

“Ho, ne estas necese koleriĝi,” li daŭrigis. “Vi ne povas ludi ‘ĉajnez’ (*ludo per ŝtonoj, vitraj aŭ marmoraj pŭketoj*), aŭ ‘ruĝhaŭtulon.’”

Tuj ŝi malaperis preter la angulo de la domo. La venko donis al li iom da plezuro, sed ĝi ne longe daŭris. La antaŭa sento de soleco revenis. Li tre sopiris je Micky. Neniam li ree havos tiel bonan amikon. Kaj cirkuso baldaŭ alvenos al la urbo, tamen preskaŭ ne valoros la penon iri tien, se oni ne havas kunulon, kun kiu oni povos poste ludi la ruĝhaŭtulajn batalojn tie vidotajn, kaj imiti la marŝadon sur streĉita ŝnurego!

Teddy leviĝis kaj estis enironta en sian hejmon, kiam li ree aŭdis voĉon. Jen ree staris la knabino, sed li apenaŭ ŝin rekonis. Ŝi venis rapide, kaj estis vestita per ruĝhaŭtula vesto! Li devis kontraŭvole almiri ŝian ĉapon, kaj mallaŭte li fajfis, dum li rigardis la plumfaskojn. Neniam antaŭe li vidis tiel belajn kolerojn.

“De kie vi ricevis ilin?” li demandis, iom jaluze.

“De mia onklo Billy,” ŝi respondis.

“Kiu li estas?” Teddy demandis.

“Li estas mia onklo,” ŝi klarigis.

Tute laŭ knabina maniero, pensis Teddy. Kial do ŝi ne povis respondi al saĝa demando? Tamen, li faros duan provon:

“Ĉu li estas altkreskinta viro?”

“Ho jes, kaj li estas vojaĝinta tra preskaŭ la tuta mondo, kaj scias pri ĉio, kaj—”

“Pri ruĝhaŭtuloj?” interrompis Teddy.

“Kompreneble,” ŝi diris, “kaj li ankaŭ povas rakonti rakontojn pri kiam li estis knabo kaj loĝis en la okcidento. Eble li nun rakontos al ni, se ni petos.”

“Ho, mi ne deziras,” respondis la knabo, penante montri indiferentecon, kvankam li efektive sentis deziregon konsenti. Metinte la manojn profunde en la

poŝojn, li kvazaŭ distrite komencis fajfi.

La knabino rigardadis lin.

“Estas dua skatolo da plumfaskoj, ĝuste similaj al la miaj,” ŝi aldonis, kaj ni donos kelkajn al vi.”

Ĉi tio estis grandega surprizo. Li ne povis imagi eĉ Micky faranta tian proponon. Dum la ekscito de la momento, ŝia invito estis akceptita, kaj ambaŭ infanoj iris por serĉi Onklon Billy kaj la belegajn plumojn.

“Kio estas via nomo?” demandis la knabino, dum ili kuniris.

“Teddy,” li respondis abrupte. “Kio estas via?”

“Ho, la mia estas Elizabeto, tamen homoj kiuj ametas min nomas min Betty (*Beti*).

La knabo respondis nenion, sed li sekrete decidis ke li neniam nomos ŝin Betty.

Onklo Billy estis tiel interesa, kiel lia nevino antaŭdiris. Teddy aŭskultis al strangaj rakontoj pri la okcidento, pri sovaĝuloj, pri multaj aferoj ne antaŭe konataj. La knabino sciis preskaŭ tiel multe kiel ŝia onklo. Sed kompreneble, ŝi jam antaŭe aŭdis tiujn rakontojn, kaj, post ĉio, ŝi estis nur knabino. Knabinoj estas tiel malfortaj estajoj. Kredeble ŝi povas ludi neniajn ludojn. Kredeble ŝi ne povas rapide kuri. Knabinoj neniam povas.

Kiam ili reiris en la korton, Teddy ekhavis bonan ideon: Li montros al ŝi kion li povas fari.

“Venu, ni kuru konkurson,” li proponis.

“Tre volonte,” ŝi konsentis, kun videbla plezuro.

Ĉar ŝi estis knabino, li permesis al ŝi antaŭan komencon.

La knabino venkis la unuan kuradon! Teddy ne atendis ĉi tion, tamen li komprenis ke tio okazis ĉar li estis permesinta al ŝi tiun antaŭan komencon. Tiu rememoro trankviligis lin, kaj li sentis fiera pri sia ĝentileco, preskaŭ tiel fiera, kvazaŭ li estus venkinta la kuradon. Tamen ne estus dezirinde ke knabino venku ĉiun konkurson, tial je la dua ili samtempe ekiris. Sed ili ne samtempe atingis la pomarbon, ĉar la knabino tien alvenis unue!

Teddy havis strangan senton en la gorgo. Lia malgranda mondo kvazaŭe suferis tertremon. Eble knabinoj do ne estas tiel malfortaj, kiel li estis supozinta, aŭ eble ĉi tiu knabino malsimilas aliajn knabinojn.

“Ho, la suno estas varmega,” ekkriis la knabino. Teddy ankaŭ sentis tre varmega, kaj tiu stranga sento en lia gorgo faris ĝin tute seka.

“Ni eniru la domon, kaj petu de Nora kelkajn kuketojn kaj glason da limonado,” ŝi sugestis.

Li ne bezonis duan inviton. Eĉ la penso pri limonado refreŝigis lin, kaj li volonte akompanis la knabinon al ŝia hejmo.

La ceteron de la posttagmezo ili ludis “ĉajniz.” La knabino ne povis venki je tio, ĉar Teddy estis ja spertulo, efektive

la plej sperta el ĉiuj knaboj samaĝaj en la ĉirkaŭajo. Tamen ŝi povis ludi,—nu, preskaŭ tiel bone kiel Micky. Tio ja estis laŭdo.

La posttagmezo pasis rapide, kaj kun granda surprizo Teddy aŭdis la voĉon de la patrino, kiu vokis lin por vespermanĝo.

“Adiaŭ,” diris la knabino, kiam li forturniĝis.

“Adiaŭ, Betty,” respondis la knabo.

Estis laca knabeto, kiu enlitigis tiun nokton, sed kiam li ekdormis li murmuretis “Kompreneble, knaboj ĉiam estas la plej bonaj, tamen knabinoj—estas —ja—bonegaj.”

La patrino nur ridetis. Si komprenis.

El la angla tradukis

ROBERT BRUCE.

La Danĝerstrato

DE BARRY PAIN.

Cap. I.

AN antikvaj tempoj vivis reĝo, kiu havis belegan filinon. Estas notinde, ke en antikvaj tempoj ĉiuj reĝoj posedis belegajn filinojn. Tiu devus konsistigi temon por reĝa komisio.

Kiel mi ĵus estis dironta, kiam mi ekpensis pri io alia, la nomo de tiu belega filino estis Princino Karamelo.

La patro ŝin adoris, kaj havis pri ŝi kiel eble plej altan opinion. Tute eble estas personojn adori kaj samtempe pri ili ne havi ian ĝustan opinion. Sed tion ne faris la reĝo. Li konsideris Princinon Karamelon kiel virinon nepre perfektan. Li sin demandis, kiel li trovos viron, kiu montriĝos duonsufiĉe bona por edziĝi je ŝi. La penso pri tio maldormigadis lin nokte. Li diradis al siaj korteganoj: “Princino Karamelo posedas la plej ravan belecon, sed ŝi ankaŭ posedas la plej grandan lertecon kaj la plej belan karakteron.” Kaj tiam la korteganoj oscedadis, dirante, ke tion ili jam rimarkis.

Cap. II.

La penado, kiun okazigis al la fabelaj reĝoj la elekto de edzoj por iliaj filinoj,

devus altiri la atenton de la Psika Esplor-Societo.

Unu tagon la reĝo eniris la ĉambraron de Princino Karamelo, kaj parolis jene: “Plej kara infano, kuŝante maldorme sur mia lito, mi elpensis rimedon, per kiu mi povos scii, ĉu iu viro meritas la honoron esti via edzo. Mi nun konstruigas straton nomotan Danĝerstrato. Ĝi estos longa unu mejlon, kaj enhavos ĉiujn tentatojn pripensotajn de la profesoroj de malbonfaroj. Tiu viro, kiu povas trairi tiun straton en la daŭro de malpli ol dudek minutoj, estos kiel la oro pruvita per fajro. Li fariĝos via edzo.”

“Dankegojn, paĉjo,” diris la princino. Sed sekrete ŝi faris proprajn aranĝojn. Nu, la strato estis konstruita kaj ekipita. Ĝi estis plena de allogajo kaj parfumo. Okazis tie frenezigaj kaj hazardaj ludoj, kaj la aspiranto devus preterpasi tablojn, kie oni ludis “pochre” kaj “orkŝun” kaj “znuka.” Ankaŭ troviĝis muzikistoj kun ŝalmo kaj taboro (la diferenco inter taboro kaj tamburino ne estas preparolinda). Troviĝis dancistinoj je superega beleco kaj supermezura amindeco. Troviĝis tabloj plenigitaj per bongustaj kaj allogaj trinkajoj kaj manĝajoj, kaj notu bone, la juna aspiranto devos eniri la straton kun malplena stomako.

Cap. III.

Precize je la oka vespere la aspiranto eniris Danglestraton. Ĉe la alia fino de la strato la reĝo atendis kun haltiga horloĝo en la mano, kaj la muzikistaro de la striaj hungaroj.

Kiam, kiel ĉiam okazis, la aspiranto ne aperis je la fino de dudek minutoj, sed telefonis, ke de nebulo li estas detenata en la urbo, la striaj hungaroj ludis arion de kanto, kies senco estas, ke "Alia bona viro malsukcesis!"

Danglestrato fariĝis populara. "Sin montri inda je Princino Karamelo" fariĝis sinonimo por morala degradiĝo, tiel same kiel "Mi petas la *Chiltern Hundreds*" signifas "Bonvolu donaci al mi nobelulecon."

Je la fino de dek jaroj, neniu estis jam prosperinta trairi Danglestraton dum la difinita templimo. Kaj la reĝo, kiu ne estis tiel juna kiel antaŭe, forte malsaniĝis.

Cap. IV.

Mortonte li alvokis al si la filmon. "Karamelo, mi faris al vi grandan kaj gravan maljustaĵon. Mi postulis por vi la perfektecon, kaj ne ekzistas perfekteco en tiu ĉi mondo. Tial mia timema sovaĝa rozo estas lasita velki sur sia trunketo, por tiel diri."

"Mi bonege aspektas ĉe arta lumo," diris modeste la princino.

"Dum mi vane serĉadis la perfektecon, restadis via vivo sen ĝojo, sen bongusto, asketa, senakva, monaheja!"

"Ne tute, kara paĉjo."

"Kion vi volas diri?"

"Nu, kiam vi diris al mi, ke vi elpensis ĉi tiun Danglestraton, mi subaĉete aranĝis diversajn aferojn kun la profesoroj de la malbonfaroj. Kaj, por ne tro malklare paroli, dum la lastaj dek jaroj mi estis unu el la tentajtoj."

LA REGO TUIJ MORTIS.

El "Printer's Pie" tradukis, kun permeso,
RICHARD SHARPE,
Torquay, Anglujo.

Sub Kaŝtana Arbo

ALORA mezjuna tago venas al sia fino. Hodiaŭ nemultaj promenantoj vidiĝas eksterdome, pro la varmega sunbrilo. Sed centoj da homoj el nia urbo kaj najbaraj urbetoj intencas ĝui plezurriĉan vesperon en la fama parko, kiu estas ja enviinda proprajo de nia urbo. Tial je sunsubiro dekduoj da tramveturiloj homplenaĵ alvenas kaj malpleniĝas ĉe la bela parkenirejo.

La parko kuŝas sur altaĵo, ĉirkaŭata de pentrinda pejzaĝo,—ampleksa valo, en kies mezo rivero arĝenta serpentire fluas inter bordoj dense kovritaj per popoloj kaj salikoj. Ĉe ambaŭ flankoj sin etendas grandaj ondemoviĝantaj grenkampoj da tritiko, sekalo, aveno kaj maizo. La tuton ĉirkaŭas aro da montoj, sur kies orientaj kaj sudaj flankoj ridetas belaj vinarbaroj. La okcidentajn kaj nordajn flankojn kaj la suprojn kovras densa arbaro el kverkoj, fagoj, kaj aliaj arboj. Ekstere, iom malproksime, la profiloj de majestaj montsuproj aperas post dubeblua nebula vualo, ĉi tie kaj tie

montrantaj blankan makulon el ĉiama neĝo.

Enirinte la parkon, ni venas al lazura lageto. Ĝia glata supraĵo tremetante spegulas la suprojn de la arbokovritaj montetoj. Je ĉiuj direktoj etendiĝas belaj aleoj kun ombrodonantaj arboj je ambaŭ flankoj. En la interspacoj vidiĝas allogaj herbejoj kaj florbedoj. Jen ni preterpasas ĉarman fontanon, suprenŝprucantan briletajn akvoradiojn, kiuj defalas al rivereto defluanta inter likenokovritaj ŝtonoj, duone kaŝitaj per flanka arbeto el jasmeno, siringo kaj junipero.

Belaj bestetoj ankaŭ ne mankas. "Ho, jen, jen!" ekkrias ravite kelkaj fraŭlinoj. "Ho, jam ĝi malaperis, kaj kia beleta etulo!" Ĝi estis sciuro, kiu suprenkuris kverkon, kaj sin kaŝis inter la folioj. Antaŭ ni subite eksaltas longorela leporo, galopegas trans la florbedojn, kaj, je nia surprizo, haltas apud herbotufo kaj atente nin rigardas. Baldaŭ ni atingas amason da homoj, kiuj plezure rigardas, en angulo de la parko, gracion kapreolidon,

rigardantan reciproke kun granda miro en la okuloj.

Antaŭen vagas la popolamaso, ĝis fine ili disiĝas du-triope. Unuj iras al la teatraĵo, kiun prezentas la parkaj aktoroj; aliaj intencas pluan esploradon de la vidindaĵoj.

Laŭ soleca vojeto vagas paro da gejunuloj. Ili ĝuas la belajojn, sed evidente trovas pli multe da ĉarmo en reciprokaj rigardoj. Tion povus diveni eĉ malspritulo, pro la vizaĝoj radiantaj je feliĉo, kaj la mallaŭtaj gajaj vortoj de la gejunuloj. Ĉu ili amas unu la alian? Jes, sen ia dubo ili estas gefianĉoj, ideala paro, kiuj sentas saman entuziasmon por samaj idealoj. Fine ili alvenas al granda, bela kaŝtano, en ekstrema angulo de la parko. Sub la majesta arbo troviĝas benko, kaj sur tiun benkon sidiĝas la gejunuloj.

Jus krepuskiĝas. Pala plenluno grade leviĝas sub la stelumita ĉielo, super la bela pejzaĝo. La siluetoj de la montetoj iom post iom malaperas en malluma mistera vualo. De malproksime, flatas la orelon dolĉaj sonoj de parka muziko intermiksata kun la rava kantado de birdoj. Venteto ĝemetas tra la florbe-

doj; disiĝas multspeca aromo, kaj bal-sama aero plenumas la regionon, refreŝigante la animon kaj ĝojigante la koron. Niaj gejunuloj sub la kaŝtano okupas sin je vigla interparolado, kiu grade cedas al silento, dum ili ĝuas kvazaŭan interkompreniĝon de animoj, akompanatan de la dolĉaj sonoj de naturo ĉirkaŭ ili. Longe la ambaŭ sidas tie, senvortaj, tute silentaj; efektive, kiam vortoj paroleblaj senpoviĝas, tiam ĝemetoj kaj ardaĵoj ekriĝas plenumas la malfacilan taskon esprimi tiun feliĉan korsenton.

La tuta naturo ĉirkaŭe simpatie vibras je la feliĉego de tiu paro, kaj la branĉoj de la kaŝtano murmuretas amike, kvazaŭ malsupren sendante benon al la gejunuloj. Mole susuretas la folioj, movate de venteto, kiu sur siaj ondetoj alportas de malproksime dolĉajn sonojn, kies signifon oni ne povas precize kompreni, sed kiuj eble alportas al feliĉa homaro la paroldsendaĵon de anĝeloj. Kiu scias? Eble la grekoj, kiuj kredis je arbaraj nimfoj, je driadoj, ne estis tute malpravaj; eble per tiuj nomoj ili penis esprimi iajn faktojn, kiujn ankoraŭ nun oni povus kompreni, se kun tute preta animo oni aŭskultus al naturo.

MICHAEL GARTNER.

Esperanto

Esperanto—word of hope—,
Language of the world,
Lo! thy banner green and white
Far and wide is furled.
Green is nature's blending tint,
White is symbol grand;
Purity and loyalty,
Both go hand in hand.

Language is the channel broad,
Bringing near the far;
Christ may be reflected through
Esperanto's star.
God is working on the earth
His own purpose true;
Through the darkness of the age
Light now shines anew.

Mighty issues are at stake,
Warnings must be given,
When God's kingdom comes below
Earth will be as heaven.
He will come whose right it is
Thrones to overthrow;
This the truth that far and near
All the world must know.

Eliza H. Morton.

El la Profundajo de la Ptomajnoj

RAKONTITA DE HOMO JUS REVENINTA EL TIE

PASANTE laŭ la vojo de vivo oni povas rimarki vojetojn forkondukantajn de la ĉefaj vojoj. Tra la malfermaĵo kie tiuj vojetoj disiras, vidiĝas malluma, malproksima, profunda valo, envolvita en nebuleta nuboj, el kiu ŝajnas leviĝi fantomaj konturoj de objektoj kies formo estas nerekoncbla, kuŝante en nepenetrebila krepusko de mistera atmosfero.

Ĝi estas la valo le la *ptomajnoj* (angle, france, hispane: *ptomaine*; ruse, *ptomainy*; germane: *leichenalkaloid*). La vojetoj kiuj forkondukas de la ĉefa vojo tute ne montras sian finigon. Ili montras la kutimajn vidaĵojn de alloga ombro kaj ripozo, kun volbaj arboj kaj florokovritaj deklivoj, promesante plezuron kaj refreŝadon al tiu laca vojaĝanto, kiu flanken iras por ripozi kaj renovigi sian forton.

Bongustaj fruktoj pendas are laŭlonge de tia vojo, ĉe ambaŭ flankoj, por tenti la apetiton; sed la vojaĝanto ne scias ke en tiuj aroj sin kaŝas mortigaj mikroboj, atendante por eniri lian korpon, celante ĝian detruon. Li elendas sian manon, kaj ne suspektante ekkaptas kaj manĝas la allogan frukton. La mortigaj mikroboj rapidas tra la malfermitaj pordoj, trovante bonan okazon kaj luksan vivlokon.

Sento de grand lacego surrampas la nesuspektintan vojaĝanton. Li opinias ke li ne povas pli antaŭen iri. Li kuŝiĝas sur la deklivo, kun doloranta kapo, dum turmentaj doloroj rampas tra ĉiu nervo, osto kaj muskolo en lia korpo. Malsanema naŭzo ekkaptas lian stomakon,—vana peno de Naturo elpeli la invadantan armeon. Komenciĝas la terura ĝismorta batalo de Naturo kontraŭ ŝiaj senkompataj malamikoj. Si mobilizas siajn batalionojn da fagocitoj kaj leŭkocitoj, kaj surjetas ilin sur la batalkampon, por mortiga batalo kontraŭ siaj malamikoj.

Dume “bona samariano” trovas la malfeliĉan vojaĝanton, kaj alportas lin

al vojflanka gastejo, ĉe la bordo de tiu malluma, nebuleta valo. Lia spirito reiras nun al la tempo de lia knabeco,—ree li ŝajnas iri al la lernejo, kaj rekonas multajn el siaj lernejkunuloj. Sed, strange, ili ne ŝajnas lin rekoni, kaj li opinias tion tre rimarkinda, ke altkreska homo, kia li estas, devas iri al la lernejo, studi la samajn malnovajn lecionojn, ludi la samajn malnovajn ludojn kun kunuloj ankoraŭ restintaj junaj, kaj fine reiri hejmen kun la familiaraj libroj sub la brako. Li sentas, la tutan tempon, ke ĉio ĉi ne estas reala, sed li ne povas kontraŭstari la misteran potencon kiu kvazaŭe antaŭen pelas lin sopirantan je ripozo. Ho, se li nur povus kuŝiĝi kaj ripozi!

Jen, tie staras homa estaĵo, kies apero plenigas lian koron je neesprimebla gojo! Jen la amata kunulino de lia junaĝo, ankaŭ de liaj malfruj jaroj. Kiom da amo elrigardas el ŝiaj okuloj! Kia mondo da ĝuado radias el ŝiaj rigardoj! Li antaŭen paŝas por ĉirkaŭpremi ŝin,—kaj ŝi ekmalaperas,—ĉu en la aeron? Li ne povas ŝin trovi; agoniante li serĉas ĉie. Jen, ŝajnas ke ŝi eniras subite aperintan vagonaron. Li penas sekvi ŝin, sed apenaŭ povas movi siajn piedojn, ĉar la muskoloj rifuzas obei lian volon. Per grandega peno li alvenas al la fino de la formoviĝanta vagonaro, saltas sur ĝian ŝtupon, kaj eniras la vagonon. Sed ŝi ne estas tie. Verŝajne li eraris; post ĉio, kredeble, ŝi ne eniris la vagonon. Malsupren saltante, li nun sin trovas en dezerta loko. Antaŭ liaj okuloj etendiĝas kilometroj da stratoj kaj senfinaj vicoj da malplenaj domoj. Ĉie regas profunda silento. Premegate de netolerabla soifo, li eniras domon post domo; ĉambro post ĉambro malfermiĝas antaŭ li en senfina perspektivo. Subite sonas post li piedfrapoj, kaj mortiga teruro plenigas lian cerbon: sendube lin persekutas demono! Aŭdante la demonon spiroblova post li, li freneze sin jetas tra la plej proksima pordo, kaj vane penas ĝin ŝlosi. Teruro kvazaŭe

donas al li flugilojn kaj li rapidas tra malfermaĵo al apuda arbaro, kiu espereble prezentos kaŝejon. La piedojn ek-kaptis amasoj da kreskaĵoj, kaj li faletis kontraŭ ŝtupoj kaj falintaj arboj; tiam li defalas de krutegaĵo, kaj falas, faladas, neniam atingante fundon, ĝis kiam fine li perdas konscion.

Kiam li vekigaĵas, ŝajnas ke iu ĉeestas, trankvile tenante antaŭ li malvarmajn trinkaĵojn. Avidas li ĝin ricevas kaj englutas. Nun li aŭdas malproksimajn voĉojn, kaj baldaŭ malfermas la okulojn,—jes, antaŭ li staras la longe serĉata amatino, la kunulino de la tuta vivo! Ree li penas ĉirkaŭpreni ŝin, sed ne povas levi la brakojn. Alvenante al li, ŝi prenas lian kapon sur sian bruston, kaj fine li trankviliĝas kaj ripozas.

“Ĉu vi estis en la vagonaro?” li demandas.

“Kia vagonaro, karulo?” ŝi respondas.

“Ho jes, vi ne eniris la vagonon, mi eraris.”

Pace li ekdormas, kaj kiam ree li vekigaĵas konataj objektoj sin montras al liaj okuloj,—la pentraĵoj sur la muro, la

bone konataj mebloj, kaj tiel plu. Nun li komprenas ke li estas en lito, en sia propra domo; kaj ekkomprenas ke li estas malsana.

“De kiom da tagoj mi estas malsana?” li demandas.

“Ho, eble ses tagojn vi kuŝis ĉi tie.”

Nun li plene rememoras: li manĝis melonon, ĉe la restoracio; aŭ ĉu la kaŭzo estis glacikonservita kokido, aŭ tiu omaro? Nu, li ne povas diri. Ofte estas malfacile eltrovi kaŭzon, kvankam la rezultato ne estas facile forgesebla.

Tro ofte la malfeliĉulo ne revenas de tiu malluma, funebra valo. Ĉu lia animo ankoraŭ vagas trans tiuj vastaj silentaj valoj, persekutite de demonoj, fantomaj vagonaroj kaj aliaj kreitaĵoj? Bedaurinde neniam sciigon ni ricevas de tiuj homoj, kiuj ne sukcesis reveni. Ni esperu tamen ke ĉe la alia flanko troviĝas vojo tra kiu la homoj, kiuj ne povas reveni al ni, fine trovas, por sia senkorpa vivado vojeton al loko, kie ili povas ripozi sur elizeaj deklivoj, eterne liberaj de la iluzioj kaj fantomoj en la valo de la ptomajnoj.

G. C. GEARN.

HISTORIO DE LA USONA STANDARDO.

Standardoj ludis grandajn rolojn en la historio de la mondo. Ili faras plej povan alvokon al patriotismo de homoj, kiuj komprenas en ili la simbolon ne nur de landpovo, sed ankaŭ de sia estimo.

La nuna vera usona standardo havis sian devenon en la decido alprenita de la Usona Kongreso, la 14an de junio en la jaro 1777. Kongreso decidis ke la standardo de la Unuigintaj Ŝtatoj de Norda Ameriko konsistu el dek tri strioj alterne ruĝaj kaj blankaj, ankaŭ el dek tri blankaj steloj en la blua kampo repre-

zentanta la novan respublikon. Tiam restis nur ke iu persono faru tian oficialan standardon.

Komitato el Kongreso, akompanite de la unua prezidanto, Georgo Washington, alvenis al la loĝejo de S-ino Elizabeth Ross, en la urbo Filadelfio, Pa. Si kun granda entuziasmo aŭskultis iliajn klarigojn, kaj ekkomencis la laboron. Sia laboraĵo estis sukcesa. La nomo de la usonanino “Betsy” Ross estas nun tre kara al la nacio, kaj laŭdata en la historio de Usono.

Tradukis WALTER M. MILEWSKI.

Mark twain (*Mark Tüen*, pseŭdonimo de Samuel Clemens, fama usona humoristo), dezirante legi iun libron apartenantan al sia najbaro, petis ĉi tiun ke li pruntedonu la libron al li. La najbaro diris:

“Mi neniam permesas ke la libroj estu forportataj el mia domo. Mi permesas ke vi legu ĝin en mia librejo.”

Poste, tiu najbaro volis pruntepreni la herbotranĉmaŝinon de Mark Twain, kaj ĉi tiu respondis:

“Mi neniam permesas ke la herbotranĉmaŝino estu forportata el la ĝardeno. Mi permesas ke vi ĝin uzu sur mia herbejo.”

El la angla tradukis

J. H. HEALD.

Pri Centra Suno

UNU el la interesaj problemoj de astronomio estas tiu pri la supozita centro de la suna rondiro. La astronomiistoj scias per delikataj observadoj, daŭrigitaj dum jarcentoj, ke la steloj ĉirkaŭ punkto en la stelaro Herkuleso dismoviĝas, kaj ke la steloj en la kontraŭa punkto de la ĉielo kunmoviĝas; tial estas neevitebla konkludo ke nia suno vojaĝas al punkto en Herkuleso. Pri la loko de tiu ĉi punkto la astronomiistoj preskaŭ interkonsentas.

Se la suna vojo estus rekta, tiu ĉi punkto en Herkuleso estus ĉiam senmova; se kontraŭe la suna vojo estas kurba, la punkto delokiĝos al la interno de la kurbo, kaj kiam oni eltrovos la delokiĝon,—eble post miljaroj,—oni povos scii la direkton de la loko kie kuŝas la centro de la suna orbito.

La leĝo de gravitado kredigas nin ke nia suno kune kun siaj akompanantaj planedoj vojaĝas ĉirkaŭ centro, obeante la altiradon de alcentra forto. La analogio de nia planeda sistemo klinigas nin kredi ke ĉiuj steloj de nia universo,—la tielnomita “vojo lakta,”—rondiras ĉirkaŭ la sama centro kaj en la sama direkto. Miliono da ili vojaĝas interne de la suna orbito, kaj kredeble pli multe da milionoj ekstere. Kiuj el ili estas internaj kaj kiuj eksteraj ni ne povas scii, ĝis kiam ni scios en kiun direkton kurbigaŝ la suna vojo. Sed atenta studado de iliaj rilataj movoj povus iom klarigi la problemon. Supozante ke la altiranta maso kuŝas plejparte ĉirkaŭ la centro, ni konkludas ke nia suno nepre moviĝas pli rapide ol la eksteraj steloj, kaj malpli rapide ol la internaj. Tial la pli proksimaj eksteraj steloj ŝajnos flui malantaŭen dum la pli malproksimaj samtempe ŝajnos flui antaŭen. Ĉiuj internaj steloj ŝajnos flui antaŭen, kun diversaj gradoj de rapideco. Sekve longedaŭra observado kaj analizo de la movadoj de steloj en ĉiuj partoj de la ĉielo povas ebligi estonte la determinadon de la direkto al kiu kurbigaŝ la suna vojo, pli baldaŭ kaj pli akurate ol la tre malfacila kaj kruda observado de ŝanĝoj en la pozicio de la suna celpinto en Herkuleso.

Malmultaj personoj krom astronomiistoj iam pensis pri la vastegeco de la stelaj movoj. Antaŭ du dek kvin jarcentoj Hesiodo jam rigardadis la samajn stelarojn kiujn ni vidas, kaj dum tiu vasta intertempo la rilataj pozicioj de la steloj tiel malmulte ŝanĝiĝis, ke se la tiama poeto povus vidi la ĉielon hodiaŭ li sendube ekrigardus nenian ŝanĝon escepte de tiu devenanta de la antaŭenmovo de la ekvinoksoj. Kaj tamen ĉiuj steloj flugas tra la spaco kun rapideco de multaj mejloj en sekundo. Nia suno moviĝas kun rapideco diverse takisita je kvin ĝis dudek mejloj en sekundo. Se oni supozas dek mejlojn en sekundo—iomete pli ol duono de la orbita rapideco de la tero ĉirkaŭ la suno—ni jam veturis de post la Hesioda tempo ne malpli ol 400,000 milionojn da mejloj tra spaco. Tamen limako rampinta unu colon en arbaro vidus pli multe da delokiĝo inter la arboj ol ni vidas inter la steloj post tiu grandega vojaĝo!

Se Hiparĥo kaj Ptolomeo estus posedintaj modernajn instrumentojn, kaj estus en sia tempo enskribintaj la rektan ascension kaj deklinacion de videblaj steloj tiel akurate, kiel oni ilin registris de post la tempo de Tycho Brahe, oni povus krude kalkuli la parton de ĝia orbito trakuritan de la suno de post ilia tago. Sed per tio, kion ni ja scias, ni ne povas supozi ke tiu parto estas pli ol unu minuto de arko cirkla. Se tio ĉi estas vera, sekvas la konkludo ke unu rondiro de la suno bezonas pli ol kvardek tri milionojn da jaroj, kaj la radio de ĝia orbito estas pli ol dek du kvadrilionoj da mejloj. Por trakuri tian distancon, la lumo, vojaĝante po 182,000 mejloj en sekundo, bezonus pli ol dudek du centjaroj.

Estas dube ĉu efektive ekzistas grandega centra suno. El la leĝo de altirado oni scias ke iu sistemo turniĝas ĉirkaŭ sia pezocentro, kaj tiu pezocentro povas esti punkto en spaco, malproksima de ĉiu el la rondirantaj korpoj. Fakte, la planedoj de nia sistemo kune kun la suno rondiras, ne ĉirkaŭ la suncentro, sed ĉirkaŭ punkto en la suno milojn da mejloj for de ĝia centro. La pezocentro estas

interne de la suno, sole ĉar la maso de la suno tiel grandege superas tiun de ĉiuj planedoj kune. Estas malfacile kredi ke en nia universo troviĝas korpo tiel treege granda ke per sia vastegeco ĝi regas la movadon de la steloj same kiel nia suno regas la planedojn, kvankam estas tute kredeble ke ia granda korpo, eble la plej granda en la universo, kuŝas ĉe la pezocentro de la stela sistemo.

Unuapense ŝajnus ke centra suno nepre estas tre brila kaj klare videbla objekto en la ĉielo. Tio ne estas necese vera. Oni supozu sunon egalampleksan kiel miliono da sunoj tiaj, kia estas la nia. Ĝia diametro estus centoble tiel granda kiel la diametro de la suno. Sekve, je distanco centobla (9,300,000,000 mejloj) ĝi ŝajnus havi saman diametron. Sed dekdu kvadrilionoj da mejloj

estas ankoraŭ 1,374,200-oble pli malproksimaj; tial la videbla diametro de la supozita suno estus 1,374,200-ono de la videbla diametro de nia suno, tio estas, ĝi subtenus angulon malpli ol 739-ono da sekundo de arko (se la videbla diametro de nia suno estas ĉirkaŭ 31 minutoj de arko), kaj ŝajnus esti, malgraŭ sia efektiva grandegeco, malgrava steleto. Sekve iu el la videblaj steloj kiuj kuŝas en la ebena rektangule ĉirkaŭ la rekta linio inter ni kaj la celpinto de la suna vojo en la stelaro Herkuleso,—se nur oni supozas la sunan orbiton proksimume ronda,—povus esti la centra suno. Kiun el ili ĝi estas ni ne povas diveni, ĝis kiam oni estos determininta, en tre malproksima estonteco, la kurbiĝon kaj ebenon de la suna orbito.

ROBERT M. BAILEY.

OKAZE DE LA SEPA.

Ofte la malgrandaj okazoj estas la plej interesaj; tial mi multe ĝuis mian renkonton kun lakvendisto en Antverpeno.

Unu tagon mi vagadis en la malrektaj, interesaj stratoj proksimaj de la katedralo. Mi admiris la antikvan arhitekturon kaj ornamon de la domoj, kaj miris pri la strangaj vestoj, kiujn kelkaj personoj portas. En la fenestroj de magazenoj mi vidis belan, allogan punton kaj forte mia animo sopiris al ĝi, kaj sekrete mi esperis havi la bonŝancon eltrovi butikon kie oni fordonas punton,—aŭ almenaŭ eble ekzistas magazeno kie oni vendas ĝin je prezo kiu permesas al ĉi la senmonulino aĉeti.

Subite mi aŭdis paŝtistan fluton. Ĉu mi ankoraŭ estis en Antverpeno aŭ ĉu mi

estis vaginta en Arcadia', vere aŭdante la flutojn de Pan?

Mi ĉirkaŭen rigardis ĝustatempe por vidi aron da kaprinoj, malaperanta ĉirkaŭ la angulo, kaj en la mezo marŝis la muzikanto, ludante dolĉan, belsonan melodion. Rapide mi sekvis, kaj miaj novmondaj okuloj vidis strangan vidaĵon. Je la eniro de unu el la mallargaj stratoj staris la paciencaj bestoj, proksimiĝinte ĉirkaŭ la mastro, kiu, anoncinte al la klientaro sian proksimecon, tiam melkis la kaprinojn por provizi la acetantojn je lakto. El la proksimaj domoj ili venis, kaj ĉar ili ricevis la puran fluajon, freŝe melkitan tiam kaj tie, ne ekzistis por ili la demando pri akvigita lakto!

DELIA C. CONDRON.

KIEL LI SCIIS.

La amikoj de la junulo pensis ke li estis mortinta, sed li estis nur en komato. Kiom post sufiĉe da tempo por eviti enterigon, li montris signojn de vivo, oni de li demandis, "kiel oni sentas kiam mortinta?"

"Mortinta," li ekkriis, "mi ne estis mortinta. Mi komprenis ĉion kio okazis, kaj mi sciis ke mi ne estis mortinta, ĉar miaj piedoj estis malvarmaj kaj mi malsatis."

"Sed, kiel tiu fakto pruvis ke vi ankoraŭ vivis?" demandis unu el la scirolaj.

"Nu, en tiu ĉi maniero: Mi sciis, ke se mi estus en ĉielo, mi ne malsatus, kaj se mi estus en tiu alia loko, miaj piedoj ne estus malvarmaj."

El la angla tradukis

G. B. C.

Book Reviews.

SEPA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. 198 pages. 90 cents.

The official report from the Central Office (in Paris), giving full details of the meetings, etc., together with list of all congress-members with addresses.

KLARIGO PRI UNITARIA KRISTANISMO, by R. A. Armstrong, B. A., translated from English by A. J. Hulme. 12 pages. 5 cents.

A short treatise aiming to present the positive elements of Unitarian faith, without emphasizing the differences between this and other branches.

RUSLANDA ADRESARO. Volume I (1912). 108 pages. 35 cents.

This book of addresses is interesting not only for those who wish to make practical use of it, but also for all who care to see statistical demonstration of the strength of Esperanto in that country where organization and propaganda are inconceivably hampered and blocked.

KONDUKANTO AL LA STACIA PILKLUDO (of the Spaulding Athletic Library). 23 pages. 25 cents.

This is the proper season of the year to remember that there exists in the International Language a Baseball Guide calculated to win for Esperanto those in whom baseball arouses sentiments of enthusiasm. Persuade your "fan" friends each to give you a quarter for this book, and send for a few copies at once. To make an effective combination, you might add a "key."

OFICIALA JARLIBRO, of the Universala Esperanto-Asocio, for 1912. 169 pages. 35 cents.

Contains the regulations of the U. E. A., various statistics, and a list of the delegates.

POURQUOI LES POSTIERS DOIVENT APPRENDRE L'ESPERANTO, by Gabriel Chavet. 47 pages. 10 cents.

A propaganda booklet, directed to postal employees. This will be useful for Canadian propagandists, as well as occasionally in the United States, in case of French-American postal officials.

LA REVUO DE LA SEPA, by Jan. 47 pages. 35 cents, postpaid. The one-act musical comedy played at the Seventh Congress.

VORTARO DE LA OFICIALAJ RADIKOJ DE ESPERANTO, by E. Boirac. 27 pages. 15 cents, postpaid.

This little list, a compilation of the "Universala Vortaro" and of the "Unua Oficiala Aldono," is convenient for esperantists who wish to be quite sure in choice of words, in differentiating between words fully approved and words proposed here and there but not accepted in general use.

KAŬKAZA KAPTITO, by Tolstoi, translated by A. N. Sarapova. 48 pages. 10 cents, postpaid.

The story of a Russian captured by Tartars, who finally escaped them. The Russian measures occasionally used point a moral for those among us who, when writing for others than our own nationality to read, use *miles, yards, pounds or quarts*, instead of the universally understood metric system.

LA TREZORO DE LA ORAJISTO, by Aügust Senoa. Translated from the Croatian by Fran Kolar-Krom. With portrait of the author. 300 pages. 70 cents, postpaid.

A historical novel, one of the most highly esteemed productions in a language whose literature is but slightly known, and previously accessible only in Polish, Bohemian, Slovenian and German translations, is now by means of the international language presented to readers of any and all nationalities. We believe this novel by the "South-slavic Turgeniev" will be read with interest by all, in spite of certain linguistic infelicities.

Book Department

Prices given are net. When postage is given after net price, this amount must be included in remittance. Terms, cash with order. No exchange on local checks. One-cent stamps accepted for small amounts. Address all letters and make all remittances payable to AMERICAN ESPERANTIST CO., WASHINGTON, D. C.

TEXT BOOKS

(To secretaries of Esperanto Clubs, to Organizers and Agents, the American Esperanto Book will be sold at a discount of 25% if five or more copies are purchased at one time. Clubs and classes using other text-books, whether in English or other language, will be allowed a discount when a number of the same book is ordered at one time. Amount of discount varies with the book and quantity desired, and will be stated upon request giving this information.)

AMERICAN ESPERANTO BOOK, Arthur Baker, cloth ***1.00.

COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman, A. M., Ph. D., cloth **1.25.

ESPERANTO AT A GLANCE, Privat, paper \$1.15.

ESPERANTO IN FIFTY LESSONS, Edmond Privat, cloth *50.

ESPERANTO FOR THE ENGLISH, Franks & Bullen, cloth *50.

ESPERANTO SELF-TAUGHT, Wm. Mann, cloth *50.

INTRODUCTION TO ESPERANTO, Arthur Baker, **08, dozen **60.

LA ESPERANTA KUNULO, J. W. Wood, *25.

LESSONS IN ESPERANTO, Geo. W. Bullen, paper *25.

STUDENT'S COMPLETE TEXT-BOOK, J. C. O'Connor, cloth *50.

THE ESPERANTO TEACHER, Helen Fryer, paper **20.

DICTIONARIES

ESPERANTO-ENGLISH, Motteau, boards **60, postage .05.

ENGLISH-ESPERANTO, Hayes and O'Connor, boards **60, postage .05.

ENGLISH-ESPERANTO, J. Rhodes, 600 pages, cloth *2.00.

VORTARO DE ESPERANTO, Kabe, cloth *1.10, postage .10.

PLENA VORTARO, Esperanto-Esperanto kaj Esperanto-Franca, E. Boirac, 2 vols., paper, each volume *1.15, postage .09; supplement *40, postage .05; both volumes and supplement bound together *3.50, postage .23.

ENCIKLOPEDIA VORTARETO ESPERANTA, Ch. Verax, bound *1.65, postage .15.

GENERAL LITERATURE

A...B...C... (Orzesko), Ender, *.15, postage .02.

ADVOKATO PATELIN (Brueys, Palaprat), Evrot, *.20, postage .02.

ALADIN aŭ *LA MIRINDA LAMPO*, Cox, *.16, postage .02.

ALICIO EN MIRLANDO (Carroll), Kearney, paper, .30, cloth .70, postage .05.

AMA BILETO (Balucki), Ender, .15.

ANGLA LINGVO SEN PROFESORO (Bernard), Moch, *.27, postage .03.

ASPAZIO (Svjentohovski), L. Zamenhof, *.65, postage .07.

L'AVARULO (Moliere), Meyer, *.20, postage .03.

AVE PATRIA, MORITURI TE SALUTANT (Reymont), Dr. Leono Zamenhof, .12, postage .02.

LA BARBIRO DE SEVILLA aŭ la Senefika Antaŭzorgo (Beaumarchais), Meyer, *.28, postage .02.

LA BATALO DE L' VIVO (Dickens), Zamenhof, paper *.30, postage .03, bound *.60, postage .04.

BILDOLIBRO SEN BILDOJ (Andersen), Lederer, bound .30, postage .03.

BLINDA ROZO (Conscience), Van Meikebeke, .30, postage .04.

BRAZILIO, Backheuser, .35, postage .04.

BUKEDO, Charles Lambert, 157 pages, paper *.55, postage .05.

CIKADO ĈE FORMIKOJ (Labiche and Legouve), Chaumont Esperanto group, *.18, postage .02.

"*CONSILIUM FACULTATIS*" (Fredro), Grabowski, *.28, .02.

LA DEVO (Ernest Naville), Rene de Saussure, *.48, postage .02.

DIVERSAJOJ (Rosny, Lemaitre, de Maistre), Lallemand and Beau, **.40, postage .05.

DON JUAN (Moliere), Boirac, *.40, postage .03.

DR. JEKYLL kaj SRO. HYDE (Stevenson), Morrison and Mann, *.35, postage .05.

EDZIGA FESTO EN KAPRI (Heyse), Meier, *.35, postage .03.

EKZERCARO of Dr. Zamenhof, with key by J. Rhodes, paper, *.35.

ELEKTITAJ FABELOJ (Grimm), Kabe, *.50, postage .05.

ELEKTITAJ FABLOJ (la Fontaine), Vailant, **.22, postage .03.

ELEKTITAJ POEMOJ (Petofi), Fuchs, *.20, postage .02.

EN FUMEJO DE L' OPIO (Reymont), Kabe, .15, postage .02.

EN MALLIBEREJO (Cirikov), Kabe, **.12, postage .02.

EN RUSUJO PER ESPERANTO, A. Rivier, *.40, postage .05.

EN SVISLANDO (various Swiss authors), Ramo, *.95, postage .10.

ENEIDO (Virgil), Vallienne, *.85, postage .05.

ESPERANTA SINTAKSO, P. Fruitier, paper ***.40, postage .05.

ESPERANTAJ PROZAJOJ, various authors, paper **.70, postage .05.

- ESPERANTISTA KANTARO**, Meier, *.30, postage .03.
- ESPERANTO-KANTARO**, .10, postage .01.
- EVANGELIO LAŬ SANKTA JOHANO**, Lowell, Grinstead & Anderson, *.08, postage .01.
- EVANGELIO SANKTA MATEO**, Miell & Stephen, **.15, postage .03.
- LA FARAONO** (B. Prus), Dr. K. Bein ("Kabe"), paper, 3 vols., each **.60, postage each .10; Half morocco, complete in two volumes *.4.00, postage .25.
- FATALA SULDO** (L. Dalsace), E. Ferter-Cense, *.90, postage .10.
- FOLIOJ DE LA VIVO** (S. Rusinol), A. Sabadell, *.30, postage .03.
- FORMORTINTA DELSUNO** (Vermandere), Van Schoor, *.70, postage .05.
- FRAZARO**, Henri de Coppet, *.30, postage .03.
- FRENEZO**, Pujula, *.28, postage .02.
- FUNDAMENTA KRESTOMATIO** de la lingvo Esperanto, edited by Dr. Zamenhof, paper **.1.00, bound *.1.40, postage .10.
- LA GASTO**, Sino. Vallienne, *.15, postage .02.
- GENEZO**, Dr. Zamenhof, *.52, postage .08.
- GEORGO DANDIN** (Moliere), Zamenhof, *.35, postage *.03.
- GUSTAF VASA**, Schmidt, *.45, postage .05.
- GIS LA REVIDO**, Noble, dozen, postpaid, **.50, single copy .05.
- HAMLETO**, *Reĝido de Danujo* (Shakespeare), Zamenhof, *.50, postage .05.
- HIMNARO**, Butler, *.16, postage .03.
- IFIGENIO EN TAURIDO** (Goethe), Zamenhof, **.60, postage .05.
- IMENLAGO** (Theodor Storm), Alfred Bader, *.20, postage .02.
- INTERNACIA KRESTOMATIO**, Kabe, paper *.35, postage .05.
- INTERNATIONAL LANGUAGE**, *past, present and future*, Dr. W. J. Clark, *.1.00, postage .05.
- LA INTERROMPITA KANTO** (E. Orzesko), Kabe, *.20, postage .02.
- KAATJE** (Spaak, Van der Biest, **.70, postage .05.
- LA KARAVANO** (Hauff), Eggleston, .30, postage .03.
- KARMEN** (Merimee), S. Meyer, *.30, postage .05.
- KIEL PLACAS AL VI** (Shakespeare), Kellerman, paper ***.50, flexible green leather ***.1.00, postage .05.
- LA KOLOMBA PREMIO** (Dumas), Papot, ***.20.
- KOMERCAJ LETEROJ**, P. Berthelot & Ch. Lambert, *.15, postage .02.
- KONDUKANTO AL LA STACIA PILKLUDO**, Erik, *.25 postpaid.
- KONDUKANTO KAJ ANTOLOGIO**, Grabowski, *.55, postage .05.
- LA KVAR EVANGELIOJ**, Pastro Laisney, *.40, postage .06.
- LINGVAJ RESPONDOJ**, Dr. Zamenhof, *.22, postage .03.
- MAKBETO** (Shakespeare), Lambert, *.50, postage .07.
- MARTA** (Orzesko), Zamenhof, *.95, postage .10.
- MINNA DE BARNHELM** aŭ Soldata Fellico (Lessing), Reinking, *.40, postage .05.
- MISTERO DE DOLORO** (Gual), Pujula, **.55, postage .05.
- MISTEROJ DE AMO**, Nadina Kolovrat, with portrait, .30, postage .04.
- LA MONAĤEJO ĈE SENDOMIR** (Grillparzer), Meier, .30, postage .02.
- LA MOPSO DE LIA ONKLO**, Chase, ***.20.
- MORALA EDUKADO** de la popola infano. Baronino de Menil, .28, postage .02.
- MORITURI VOS SALUTANT** (Papazjan), Davidov, .12, postage .01.
- NAŬ HISTORIOJ PRI L' AUTORITATO** ("Multatuli"), J. L. Brunijn, *.18, postage .01.
- PAGOJ EL LA FLANDRA LITERATURO**, *.40, postage .05.
- PATRINO ANSERINO**, Stoner, **.25, postage .02.
- PATROJ KAJ FILOJ** (Turgenev), Kabe, **.70, postage .05.
- POLA ANTOLOGIO**, Kabe, *.55, postage .05.
- POLIGLOTA VADE MECUM DE INTERNACIA FARMACIO**, Celestin Rousseau, 1.80, postage .20.
- LA PREDIKANTO**, Dr. Zamenhof, *.20, postage .03.
- PREDIKO SUR LA MONTO**, John Beveridge, *.06, postage .01.
- PRI APENDICITO** (Morris), Besemer, .10 postpaid.
- PROGRESADO DE LA PILGRIMANTO** (Bunyan), J. Rhodes, *.40, postage .05.
- PROVERBARO ESPERANTA**, M. F. Zamenhof, *.50, postage .05.
- PROZO KAJ VERSOJ**, Vincente Inglada, *.55, postage .05.
- PSALMARO**, Dr. Zamenhof, *.65, postage .10.
- LA RABISTOJ** (Schiller), Zamenhof, **.60, postage .05.
- RAKONTO KAJ ADVENTURO**, Hall & Barroll, ***.15.
- RAKONTOJ AL MIA BELULINO** (Jean Bach-Sisley), Toucheboeuf, *.50, postage .05.
- RAKONTOJ PRI FEINOJ** (Charles Perrault), Sarpy, *.27, postage .03.
- REGO DE LA MONTJOJ** (Ed. About), Gaston Moch, illustrated by Dore, *.90, postage .10.
- LA REVIZORO** (Gogol), Zamenhof, *.42, postage .08.
- LA ROMPANTOJ**, Pujula, illustrated, *.28, postage .02.
- SENTEŬOJ DE SALOMONO**, Dr. Zamenhof, *.40, postage .05.
- SHERLOCK HOLMES EN SERVO DE LA HISPANA TRONO** (Vavris), Kuhn, Prochazka, **.23, postage .02.
- SUB LA MEZNOKTA, SUNO**, Lehman Wendell, paper ***.35, cloth ***.60.
- SUB LA NEGO** (J. J. Porchat), J. Borel, **.30, postage .05.
- SUFERO** (Camen Sylva), Lederer et al., ***.28, postage .02.
- SI KLINIGAS POR VENKI** (Goldsmith), Motteau, bound, *.40, postage .05.
- TRA LA ESPERANTA LITERATURO** *.30, postage .03.

TRI UNUAKTAJ KOMEDIOJ, Kotzebue, Williams Hankel, **.25, postage .03.
UNUA LEGOLIBRO, Kabe, paper, **.50, postage .05.
LA VENTEGO (Shakespeare), Motteau, bound, *.70, postage .04.
VERSAJOJ EN PROZO (Turgenev), Kabe, *.30, postage .03.
LA VIRINETO DE LA MARO (Andersen), Dr. Zamenhof, *.40, postage .05.
VOJAGO INTERNE DE MIA CAMBRO (Maistre), S. Meyer, *.20, postage .02.

BOOKS NOT PREVIOUSLY LISTED

ALBRECHT DURER (Nüchter), German Esp. Ass'n. Handsome edition, many illustrations, \$1.50.
ALINE (Ramuz) de Saussure, .60.
ANTAŬEN KUN KREDO (Various authors and translators, mostly Polish), .80.
LA BLONDA EKBERTO (Tieck), Fischer, .20.
DEMANDARO pri la Historio, Literaturo kaj Organizajoj de Esperanto, Ladevèze, .35.
DISROMPU NI LA INTERMUROJN, Teozofianjno, k. t. p., .12.
DRESDEN KAJ LA ESPERANTISTARO, (Guidebook), .12.
DRESDEN (20 views, with names), .40.
ELEKTO EL GERMANA KANTREZORO (Erk), German Esp. Ass'n, .50.
ELIRO ("Exodus"), Zamenhof, .65.
FABIOLA (Wiseman), Ramo, *.100.
FUNEBRA PAROLADO pri Louis de Bourbon, Prince de Conde (Bossuet), Bastien, .30.
HALKA (Wolski), Grabowski, .30.
HERMANO KAJ DOROTEO (Goethe), Kuster, .35.
KARA PANJO (Gordon), Gego, .20.
LA KATO (Rajberti), Tellini, .20.
KION LA VIVO ALPORTIS, Schulhof, .15.
LA KONFESO (Tolstoj), Tenner, .35.
LEGENDOJ (Niemojewski), Kuhl, (bound), .70.
LIBRO DE KANTOJ (Heine), Various translators, .10.
LÜBECK (Guidebook), Lübeck Esp. Societo, .15.
LA MALSANULO PRO IMAGO (Molière), Velten, .15.
MAZEPA (Slowacki), Grabowski, .65.
ONDINO (de la Motte Fouqué), Myslik, .35.
OSTLORN (Ulfers), Wessel, \$1.00.
LA PLEJ BONAJ SPIRITAJOJ (from Fliegende Blätter), Jost, .45.
PORTRETO (Gogol), Fišer, .35.
SPIRITA JUVELARO (Prayerbook), P. P. Pastro, cloth, .50. Leather, .80.
TRADUKOJ TRI (Helliwell), Helliwell, .25.
TRI MORTOJ (Tolstoj), Sidlovskaja, .15.
LA VENDETTA (Balzac), Merckens, .35.
IMITADO DE JESU-KRISTO, translated by Deschamps, .35.
LA AMKONKURANTOJ, Schmidt, .20.

ARTISTA BIBLIOTEKO INTERNACIA, Devjatnin, .15.
EN DANGERO, Unterman, .75.
ESPERANTISTA POSKALENDARO, 1912, Schramin, .35.
ESPERANTO-GVIDANTO pri la Publika Interkomunikigado, Richter, .35.
ILUSTRITA GVIDLIBRO TRA KRAKOW kaj Cirkaŭaĵo, .20.
KARATERO (van Styprian Luscius), .15.
KRESTOMATIO POR INFANOJ kaj Komencantoj, Frenckell, .15.
HISTORieto DE ESPERANTO, Fišer, .15.
LA KRIMOJ DE DIO (Faure), Carlos and Buokin, .10.
PAULO DEBENHAM, Luyken, .55.
POR KVIETAJ PERSONOJ (van Driesche), Amatus, .20.
PRI ESPERANTA LITERATURO, Privat, .20.
PEJZAGOJ EN AUSTRIO, .20.
SKIZOJ EL MIA PROPAGANDA VIVO, Marich, .15.
VIDAJOJ DE SENLIMO, Finot, .10.

BUY BOOKS WITH A
COUPON TICKET

You get \$5.50 in coupons for \$5.00, or \$11.00 for \$10.00. The saving in money is good, but the saving of time is better. Quick and convenient remitting—if you want three books, worth \$1.65, you just cut off \$1.65 in coupons and mail it in. Suppose, as sometimes happens, the 35-cent book is out of print—back comes a 35-cent string of coupons and the transaction is closed. No waiting at the post office window for a money order!

Convenient? That's where we get even—it's so convenient that it makes ordering books a positive pleasure.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY
DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 42 literojn punktojn aŭ spacojn.]

S-ro Wm. Mason, Cashier Educational Dept., Albany, N. Y.
 S-ro M. Hlopotov, N. -Tagil, Permsk., Gul., Russia.
 F. H. Battey, West Branch, Io. Ciam respondos.
 S-ro Jesse I. Van Huss, Nowata, Okla.
 S-ro Anton Nemeč, Coblenzerstr. 51, Frankfurt a.M., Germanujo.
 S-ro Clyde Kennedy, Far, W. Va.
 S-ro G. Kurkovskij, Ujezdnoe Zemstvo., Ufa, Russia, P. K., P. M. ĉiam respondos.

Cut Out and Mail Today

| | | SPECIAL PROPAGANDA NUMBER | | |

AMERICAN ESPERANTIST CO., Washington, D. C.

Samideanoj:

Please find enclosed the sum of \$....., for which send me a bundle of.....copies (at five cents per copy) of the SPECIAL PROPAGANDA NUMBER OF AMERIKA ESPERANTISTO. I wish to co-operate to this extent in your efforts to interest others in our great movement.

Name.....

Date..... Address.....

ESPERANTO STATIONERY

Fine quality paper with engraved green star and word "Esperanto."

One quire, with envelopes to match, 65c. postpaid.

Sample sheet and envelope, 4c.

American Esperantist Company

ĜIS LA REVIDO

Societies giving this play should distribute copies to the audience. Single copy, five cents; 25 copies @ 4c. each; 50 @ 3c.; 100 copies, \$2.50.

American Esperantist Company

POSTAGE STAMPS

We wish to buy all kinds of cancelled postage stamps. Send description of any which you have to sell, or send on approval, and we will make offer. Write us before you sell!

300 all different foreign stamps from Argentina, Chile, Bosnia, Greece, India, etc., sent postpaid for 40 cents. This is a fine lot with which to start a stamp collection.

Full particulars about stamp collecting and how to make a collection sent upon request. If you are interested in stamp collecting it will be to your advantage to send us your name and address.

WASHINGTON STAMP CO.

P. O. Box 2466 Washington, D. C.

Reference: American Esperantist Co.

ESTAS MALFERMITA POR LA JARO 1912
ABONO AL LA GAZETO

„La Ondo de Esperanto“

(laŭ la adreso: Moskvo, Rusujo, Tyerskaja, 26)

Dum la IV-a jaro de sia regula funkciado „La Ondo“ senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 n-roj (16—20 paĝaj) la speciale por tiu celo tradukitan de s-ino M. Sidlovskaja ĉefverkon de rusa literaturo:

„Princo Serebrjaniĝ“ de TOLSTOJ

(302-paĝa, grandformata libreĝo, kies prezo por la neabonantoj estos afrankite Sm. 1,60). Literat. konkursoj kun monpremioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Beletristiko origin. k. traduk. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako. Korespondo tutmonda (postk. ilustr.).

La abonpagon (2 rubl.=2,120 Sm.) oni sendu al „Librejo Esperanto“ (26, Tyerskaja, Moskvo, Rusujo) aŭ al aliaj Esper. librejoj, poŝtmandate, respondkupone, papermone aŭ per bankĉekoj.

Send subscription (\$1.10) through American Esperantist Company, Washington, D. C.

**Printing ???
ESPERANTO or ENGLISH**

Have your work done by the first and best Esperanto printer in America.
Clearly accented type. Skilled workmen. Modern machinery.
Prices low. Workmanship careful.
Material good.
Letterheads for Esperanto societies and officers.

ERNEST F. DOW, W. Newton Sta., Boston, Mass.

La rusa fabrikisto de alumetoj taŭĝe elektis por sia fabrikmarko la birdon flamingon.

S. W. T.

LA REVUO

*The best literary magazine entirely
in Esperanto*

The only magazine which has the constant collaboration of
Dr. L. L. ZAMENHOF, *the author of Esperanto*

Yearly Subscription \$1.40

Single Copy, postpaid, 15 Cents

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

AGENTS FOR U. S. A.

N. B.—The American Esperantist Company has on hand a quantity of back numbers, equally as good as current numbers from a literary point of view. These we will dispose of, as long as they last, at ten cents a copy, twelve copies for \$1.00. We can not guarantee to send any special numbers at this rate.

DANUBO

An excellent thirty-two page monthly, published WHOLLY IN ESPERANTO, as the organ of the ROUMANIAN and BULGARIAN esperantists.

Contains an abundance of good literature, on many diverse subjects, a monthly report of the progress of the Esperanto Movement, etc.

This carefully edited magazine, published in Bucharest, should be among the foreign periodicals taken by every American esperantist.

Have YOU subscribed yet?

Subscription, 80c Sample Copy, 10c

American Esperantist Co.

Washington, D. C.

GERMANA ESPERANTISTO

Duonmonata gazeto por la disvastigo de
la lingvo Esperanto.

La gazeto aperas en *du eldonoj*, kiuj duonmonate alternas.

Eldono A, eliranta la 5 an de ĉiu monato, celas la *propagandon por Esperanto*. Ĝi enhavas tiurilatajn artikolojn en germana kaj esperanta lingvoj kaj kronikojn pri la germana kaj internacia Esperanto-movado.

Eldono B, eliranta la 20 an de ĉiu monato, estas *pure literatura*. Ĝia enhavo konsistas el plimalpi facilaj legajoj kiel eble plej bonstilaj, ekzercoj kun apuda germana teksto, por komencantoj kaj progresintoj, bibliografio, konkursoj, praktikaj konsiloj, enigma parto k. t. p.


Jara abonprezo por Germana kaj Aŭstrio-Hungara 4 M. (2 Sm.), por ĉiuj aliaj landoj 2.250 Sm.

La abonoj nur komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro.

Lüdezire oni povas *aparte aboni ĉiun el ambaŭ tute sendependaj eldonoj* por la duono de la supre montritaj prezoj.

Esperanto Verlag Möller & Borel
BERLIN SW. 68, Lindenstr. 18/19.

Send subscription (\$1.15) through American Esperantist Company, Washington, D. C.



Emerson Pianoj

Koncertaj kaj Rektaj

FONDITA 1849

La piano por la artisto kaj la hejmo. Unu grado—unu kvalito. La plej bona kiun nia deziro kaj sperto permesas. "Emerson, Boston," aperas en la metala aŝeto sur ĉiu piano farita de ni.

Vendata je prezo kiu reprezentas la veran valoron.

100,000 Emerson Pianoj estas uzataj de la muzikama publiko tra la mondo

Al ĉiu interesta esperantisto NI VOLONTE SENDOS EKZEMPLERON DE NIA KATALOGO, kiu montras per ilustraĵoj la historion de la fortepiano. Petu la katalogon per karto esperante skribita.

EMERSON PIANO CO.

Boston (560 Harrison Ave.) Usono

Oficiala Gazeto Esperantista

Organo de la Lingva Komitato
De la Konstanta Komitato de la Kongresoj
Kaj de la Internacia Konsilantaro

Jara Abono: 5 Frankoj

Unu Numero: 50 Centimoj

Redakcio kaj Administracio:
51, RUE DE CLICHY, PARIS

EL LA DECIDARO DE LA SESA KONGRESO:

LA SESA KONGRESO MEMORIGAS AL ĈIUJ SOCIETOJ KAJ GRUPOJ, KE LA ABONO AL LA OFICIALA GAZETO ESTAS UNU EL LA PREJ BONAJ RIMEDOJ POR HELPI FINANCE LA OFICIALAJN INSTITUCIOJN DE ESERANTO, KAJ POR ESTI REGULE INFORMATA PRI ILIAJ LABOROJ.